



NEDERLANDA ESPERANTISTO

Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio
"La Estonto Estas Nia"

30-jara; n-ro 5-a. Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk. Jara abono por ne-membroj: gld. 4,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

EVIDENTA PROPAGANDO.

Sendube pluraj gesamideanoj sin demandas: „Kion mi povas fari por propagandi Esperanton”? Guste dirite: „Kion mi povas fari por plibonigi la propagandon”. Ja estas konata fakto, ke ni jam dum multaj jaroj propagandas diversterene. Pri la rezultatoj de nia laboro oni povas malsamopinii. Tamen pri la fakto, ke la apliko de Esperanto en la ĉiutaga vivo faras la plej bonan propagandon por nia lingvo, preskaŭ ĉiu konsentas.

La homo, kaj precipe la nuntempa, ŝatas sperti profiton el ĉio. Do kial ne el Esperanto? La novbakita esperantisto rajtas postuli, ke li per Esperanto povu profiti el Esperanto tiel same kiel el alia lingvo. Estas tial, ke U.E.A. havas vastan delegitan reton en la tuta mondo. Ĉiu delegito, bone plenumante sian taskon, faras tre utilan propagandon por nia afero *en la praktiko*. La inform- aŭ helpopetanto spertas, ke li ne vane lernis nian lingvon, sed ke li ĝin povas uzi por ĉiuj aferoj.

Grava artikolo pri la delegita reto de U.E.A. aperis en la revuo „ESPERANTO”. La verkinto, s-ro M. Jaumotte, ne nur tuŝas la mankojn, sed ankaŭ indikas al ni la vojon irendan.

Ne sufiĉas konstati tion kaj danki s-ron Jaumotte, necesas ke ni helpu lin. Precipe lia atentigo pri la graveco de l' turismo kaj pri la nove starigita fakto „SOS-aŭto-servo” meritas nian atenton kaj . . . kunlaboradon.

Tial mi petis s-ron Jaumotte pli detale

informi pri la farenda laboro. Ĉar mi opinias, ke multaj gesamideanoj en Nederlando kompleksas kunlaboradi, tial mi citas el la informoj de s-ro Jaumotte, por ke tiuj gesamideanoj, kiuj volas kunlabori, povu scii pri la necesa laboro.

„Pri turismo mia ideo estas, ke tiu ĉi FAKO estas eble LA plej interesa, ĉar estas eble la nura, per kiu ni kapablas TUJ kaj EVIDENTE prui la utilcon de Esperanto: kaj al hotelistoj kaj restoraciistoj kaj al kandidat-esperantistoj.

Mi tutkore akceptas vian proponon indvidue kunlabori. La celo de mia kampanjo estas cetera akiri multajn unuopajn kunlaborojn, des pli ke mi spertis, en la lastaj monatoj, ke la vojo, kiu iras laŭ la naciaj asocioj estas longa, iom administrita aŭ diplomata . . . sed vere ne rekta! Mi klarigas: NE gravas, ke ni havu turisman delegiton en iu perdita loko, kie neniam rondvojaĝos eksterlandano; sed gravegas, ke ni havu en ĈIUJ urboj aŭ turismaj centroj, kien la *oficialaj instancoj* per elspezo de multe da mono klopodos altiri la eksterlandanojn. Tie kuŝas por tiuj naciaj societoj UNUA TASKO, kiun ili, ni diru „ĝenerale”, NE plenumas. . . . Kaj por kiu unuopa esperantisto eble povas trovi solvon.

Pri ĈIUJ pritemitaj lokoj ni devus posedi FOLION, simplan folion, kun neliteratura, sed *klara* priskribo: ekzakta situo de la urbo, je tiom da kilometroj de la plej apudaj konataj urboj; enloĝantaro kaj eventuale surfaco. Vivrimedoj: industrio, haveno, turisma centro k.t.p. En

ASOCIAJ INFORMOJ.

ATENTU:

Bedaŭrinde enŝteliĝis en la aliĝilon por la Jubilea Kongreso de L.E.E.N. du preseraroj. En la 17-a linio de malsupre oni legu:

Aliĝiloj estas akceptataj nur ĝis 1-8-1965.

En la 10-a linio de malsupre oni legu:

Ĉu vi partoprenos la ekskurson sabaton 25/9 posttagmeze? Bonvolu korekti ilin.

aparta paragrafo: vidindaĵoj, eventuale kun atentigo pri ties graveco (indiko per steletoj aŭ ciferoj).

Poste, tre klare, la maniero la plej bona por viziti la urbon, se oni disponas, kiel multaj preterpasantaj aŭtomobilistoj, *pri unu aŭ pli da horoj*; pri duona tago, plena tago aŭ (por kelkaj grandaj aŭ gravaj urboj) *pri pluraj tagoj* (en tiu okazo: eblaj ekskursoj).

Kun ebla atentigo pri hotelaj rimedoj: nombro da hoteloj de diversaj klasoj aŭ nombro da ĉambroj, kampadaj eblecoj k.t.p. La tuto postulus, laŭ mi, unu plenan paĝon de nia Revuo.

La intenco estus uzi, post finaperigo de la „Terminaro”, tiujn paĝojn por presigo de tiaj folioj, de kiuj ni presigus iun nombron da pliaj ekzempleroj, kiuj restus je dispono de la „Aŭto-Klubo-Turisma Klubo” por poste informi interesitojn.

Ĉar tiaj folioj ne jam ekzistas kaj por iniciati la aferon, mi volus peti vin, ĉu vi, ekzemple pri Hago kaj pri Scheveningen kaj eble pri Rotterdam aŭ aliaj apudaj urboj, ne povus kunmeti unu aŭ plurajn tiajn foliojn (eventuale kiel por Hago en kunlaboro kun viaj grupanoj).

Se vi povus jesi al tiu demando, tiu via folio povus esti uzata *ekzemple* por aliaj bonvolemluloj, al kiuj ni povus ĝin sendi por montri, kion ni deziras... Kaj eventuale ni povus ĝin presigi en la Revuo, por voki atenton kaj laboremon de aliaj, kiuj eble hezitas!

Ne estas necese aldoni multon. Nur pri unu punkto la jeno: Kial atendi ĝis aperigo de priskribo koncerne Hagon? Ĉu ne estus pli bone, ke en ĉiu grava kaj granda urbo en Nederlando iu samideano tuj komencu en tiu ĉi EVIDENTA PROPAGANDO?

Ni montru al s-ro Jaumotte, ke ni konsciu nian taskon!

A. Breddels.

Ne metu viajn perlojn . . . ktp.

Ĝis nun niaj kluboj klopodas aranĝi tiel, ke la kostoj por Esperanto-kursoj estas kiel eble plej malataj, pro timo, ke eble tro altaj kostoj fortimigos kursontojn. En la unua vido tiu sistemo taŭgas, ĉar ni allogas scivolemulojn kaj poentantojn de veraj interesigantoj. Poste la intereso malaperas kaj la lernantoj pensas, ke per finado de la studo ne multa mono estas perdita.

Ni ŝanĝu tiun sistemon. Ĉiuj kursanoj almenaŭ fariĝu anoj de la koncernaj sekcioj. Aŭtomate ili tiam estas anoj de L.E.E.N. Krome ili fariĝu anoj de UEA. La kotizoj estu parto de la tutaj kostoj de la kurso.

Pro tio la kursanoj ricevas la bultenojn de la kluboj, la organojn de LEEN kaj UEA kaj ambaŭ partojn de la jarlibro. Ili vidas, ke ili estas parto de granda organizo kaj ricevas en la manojn la palpeblajn rezultojn de sia studado.

Se oni komparas la tuton de ĉiuj kostoj, do inkluzive de tiuj de la kurso, studlibroj k.t.p. kun tiuj de kursoj por la aliaj lingvoj, ili ankoraŭ estas ridinde malataj kaj ne povas esti malhelpo por serioza interesato.

Se eventuale iu entuziasmulo kun maldika monujo sopiras lerni Esperanton, tiam ankoraŭ ekzistas sufiĉaj aliaj vojoj por helpi lin aŭ ŝin.

Dankon, garantiintoj!

La finkalkulo pri la 49-a Universala Kongreso jam estas farita. Kun granda plezuro ni povas informi, ke ĝi finiĝis kun favora saldo, el kiu ricevis siajn partojn L.K.K. kaj L.E.E.N., laŭ la difinoj en la Kongresa Regularo. La definitivajn ciferojn siatempe publikigos U.E.A., kiam la kalkulo estos aprobita ankaŭ de la Komitato de U.E.A.

En la nuna momento ni deziras nur danki al la personoj, kiuj partoprenis en la Garantia Kapitalo, sumo de 5000,— gld. laŭregulare trovenda de L.K.K. inter la esperantistoj kiel garantio por kovri eventualan deficiton. Neniu sumo estis pagenda antaŭe, sed la deklaro pri preteco pagi en kazo de bezono estis granda kaj grava morala helpo por la Kongreso. Tial tiuj garantiintoj, troviĝantaj dise tra la tuta lando, meritas ĉi tie publikan dankon pro tiu garantio.

L.K.K.

U.E.A.

L.E.E.N.

ĈE LA DUDEKJARA DATREVENO DE LA LIBERIGO.

J. C. Bloem:

Na de bevrijding.

Schoon en stralend is, gelijk toen, het
voorjaar,

Koud des morgens, maar als de dagen
verder

Opengaan, is de eeuwige lucht een
wonder

Voor de geredden.

In 't doorzichtig waas over al de brake
Landen ploegen weder de trage paarden
Als altijd, wijl nog de nabije verten
Dreunen van oorlog.

Dit beleefd te hebben, dit heerlijk uit te
Mogen spreken, ieder ontwaken weer te
Weten: heen is, en nu voorgoed de
welhaast

Duldloze knechtschap.

Waard is het, vijf jaar gesmacht te
hebben.

Nu opstandig, dan weer gelaten, en niet
Eén van de ongeborenen zal de vrijheid
Ooit zo beseffen.

Post la liberigo.

Kiel tiam, bela printempo brilas,
Freŝa frue, kiam sin pli malfermas
Tag', miraklo estas l' aer' eterna
Por la savitoj.

Senlaboran vaporaeran teron
Plugas malrapidaj ĉevaloj ree
Kiel ĉiam, dum la duonproksimo
Grumbilas milite.

Tiu sperto, tion eldiri povi
Sana, ĉiam revekiĝinte scii:
Pasis sen reven' la sklaveco preskaŭ
Netolerebla.

Ĝin valoras iama sopir' kvinjara,
Jen ribela, jen lackvieta, kaj ne
Unu nenaskito liberon iam
Tiel konscios.

Tradukis:

d-ro W. A. Verloren van Themaat.

KLARIGOJ PRI BLOEM

J. C. Bloem (prononcu: Blum; naskita en 1887) estas unu el la plej konataj vivantaj nederlandaj poetoj. En sia junaĝo li estis romantikano kun grandaj deziro kaj ribelemo. Sed kiam li iĝis pli aĝa, tiuj romantikaj deziro kaj ribelemo iom post iom cedadis por rezignado, kiu atendas ne multe de la vivo, sed estas kontenta je la malmultaj bonaĵoj, kiujn la vivo povas doni. El tiu fundamenta sentado naskiĝis ankaŭ tiu ĉi poemo, kiun li verkis en 1945, post la liberigo de Nederlando de la germana okupado.

Nederlando estis okupata de la germanoj en majo 1940; ĝi estis liberigata ankaŭ en majo (de 1945). Tial li skribas: kiel tiam, bela printempo brilas.

Ŝajnis al ni bone flanke de la Esperanto-traduko ankaŭ presigi la originalan tekston, el la kolekto „Sintels” (1945).

„TEJO” AKTIVAS.

La „Jaro de la Junularo” alportis al „TEJO” gravajn progresojn. Kun eĉ pli da energio ĝi nun daŭrigas tiun evoluon. Junaj legantoj kaj instruantoj de kursoj por gejunuloj: se vi ne jam posedas la nederlandlingvan varbfolion pri „TEJO” (bele ilustritan kaj presitan), petu ĝin tuj senpage (precipe ankaŭ propagandcele) ĉe: Kastelestraat 231, Amsterdam Z.

Post lego agu konforme kaj fariĝu individua membro de „TEJO”.

Pli aĝaj legantoj: abonu la revuon „Kontakt”, ĝirante gld. 8,— al la ĝirkonto de UEA 37 89 64, klare indikante, ke temas pri abono al tiu luksa, kvaronjara, junulara revuo.

Por lernejoj kursoj ekzistas kolektivaj abonoj je grave reduktita prezo.

H. Bakker jr.

EL LA SEKCIOJ.

Sekcio Hago.

Sekr.: Valkenboskade 502.

La 12-an de marto pasintan okazis en restoracio „Hertenkamp” en Hago HEKK-vespero sub aŭspicio de LEEN, en kiu s-ro Aŝvinikumar' el Hindujo, nun studanta ĉe universitato en Amsterdamo, prelegis pri sia fora patrujo. Brile parolante li ebligis sian aŭdantaron ĵeti rigardon sur la hinduan religion kun ĝia eterna ciklo de renaskiĝoj: postmorta restado en infero aŭ paradizo kaj reveno sur la teron kun la rezultoj de la antaŭa vivo.

Tre interese estis ankaŭ aŭdi iom pli pri la kvar kastoj kaj la kvar eraoj, kiuj al multaj okcidentuloj estas nur nebule konataj.

Post la paŭzo s-ro Aŝvinikumar' pritraktis la lingvan problemon, kiu nun estas tiel aktuala, kaj respondis al kelkaj demandoj. Sed ne nur la interesa enhavo de la prelego estis tiel elstara, ankaŭ la belega parolmaniero! Kia ĝuo aŭskulti tian perfektan Esperanton! Kvankam relative „nova” esperantisto, s-ro Aŝvinikumar' parolas ĝin kiel sian gepatran lingvon kaj ne estas mirige, ke li gajnis premion dum la pasinta Universala Kongreso en Hago en la oratora konkurso. Antaŭ la fermo de la vespero s-ro Aŝvinikumar' atentigis pri la grava fakto, ke aperos esperantlingva libreto, bele ilustrita, pri Anne-Frank-domo en Amsterdamo, se estas minimume 500 antaŭmendoj!

Li kolektis jam 300 kaj multaj ĉeestantoj anoncis sin en la salono. Estas tre grave, ke krom la alilingvaj broŝuroj aperos ankaŭ esperantlingva ekzemplero.

Mendu ĝin grandskale je f 1,50 ĉe s-ro Aŝvinikumar', Westermarkt 16, kamer 44, Amsterdam-2.

Viaj eksterlandaj korespondamikoĵ certe volonte ricevos ĝin de vi!

E. O.

Sekcio Zaandam.

Sekr.: P. L. Takstraat 64.

Ni intencas daŭrigi la disdonadon de la gazetarmapoj ankaŭ dum la estontaj monatoj. Dek kvin gemembroj akurate legadas la interesajn esperanto-gazetojn.

Kompreneble aliaj anoj ankoraŭ povas partopreni. Ili sin simple anoncu ĉe la sekretario.

„PACEN”, Leiden.

Sekr.: Nassaulaan 30, Oegstgeest.

La 24-an de marto lasta en restoracio „Zomerzorg”, Leiden, okazis la kontakt-vespero por la gepartoprenantoj en la gazetkurso en „De Leidsche Post”. La intereso estis granda kaj la salono plenkplena.

S-ro Valkenburg bonvenigis la ĉeestantojn, inter kiuj estis ankaŭ kelkaj partoprenintoj en la haga „Posthoornkurso”, kiun li administris pasintjare. Poste s-ino J. Koopmans-Schotanus, nia konata Esperanto-kantistino, kantis nian himnon „La Espero” kaj alian kanteton, kiu klare esprimis kiel necese estas lerni Esperanton.

S-ro Kervers, la kompilanto de la kurso, faris entuziasmigan paroladon pri la historio de Esperanto kaj ĝia utileco en la praktiko, i.a. rilate al la kontaktoj kun eksterlandaj esperantistoj pere de la reto de delegitoj de U.E.A.

Poste s-ro Andreo Cseh, nia malnova granda propagandisto por Esperanto, instruis la ĉeestantojn paroli Esperanton laŭ sia famkonata metodo. Post kelkaj minutoj la tuta ĉeestantaro respondis Esperantlingve liajn demandojn.

Dum la paŭzo la gekursanoj konatiĝis kun siaj korektantoj kaj povis admiri la belan librostandon, prizorgitan de la A.P. Boekwinkel.

Post la paŭzo la en Hago jam konata Esperanto-duo „Janjo kaj Ranjo” kantis kelkajn originalajn Esperanto-kantetojn, kiuj estis tre ŝataj de la ĉeestantoj kaj denove ilustris kiel bele Esperanto sonas. Je la 22.45 s-ro Valkenburg fermis la sukcesplenan vesperon.

KORESPONDPETOJ.

Margarete Kujawa, 17-jara knabino, dez. kor. Adr.: VENDRYNE, 144, okr. Frydek-Mistek, Ĉeĥoslovakujo.

Frant. Kučera, Na popluzí 10, USTI n L., ĈEĤOSLOVAKUJO, dez. kor. kun Esp. el NAARDEN kaj AMSTERDAM pri ĉeĥa pedagogo Comenius.

Kiu volas korespondi kun jugoslavo pri kunikloj, abeloj, kortobirdoj, kolomboj kaj ilia bredado? Inf. kaj adreso haveblaj ĉe s-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem.

Rezervu la 24-an ĝis la 26-a de septembro 1965 por Nia Jubilea Kongreso.

VIDU LA PROGRAMON EN LA MARTA NUMERO.
KAJ LA ALIĜILON EN LA APRILA NUMERO.

Bonvolu ensendi vian aliĝilon kiel eble plej baldaŭ.

La Komitato.

STUDVOJAĜO DE BELGAJ PROFESOROJ.

Grupo da Belgaj Esperantistaj profesoroj el Verviers, Belgujo, sub gvidado de s-ro Vanbreuse, petis la tian ministron pri edukado, doni al Esperanto la samajn rajtojn kiel ĝi havas nuntempe en Nederlando.

La ministro komisiis al ili pristudi la situacion surloke kaj poste raporti pri ĝi. En la komenco de aprilo komisio de ses geprofesoroj rondveturis tra la okcidenta parto de nia lando kaj sub la aŭspicio de la fondaĵo: „Esperanto bij het Onderwijs” ili vizitis diversajn Esperantaj kunvenojn. Mi havis la honoron kaj la plezuron gvidi ilin.

Jen la kontaktoj, kiujn ili faris: En Haarlem ili renkontis kelkajn esperantistojn de la tiea klubo kaj agrable interbabilis. Dum tiu kunveno ili spertis (kelkaj por la unua fojo) la valoron de Esperanto por la internaciaj kontaktoj, ĉar kiel franclingvuloj ili ne povis naci-lingve paroli kun la Harlemano. En Amsterdam ili ĉeestis lecionon de s-ro Pragano en la porinstruista seminario. Ili povis tie konstati, ke ni serioze klopodas pripari por la nova ŝtata diplomo la instruistojn, kiuj poste povos kaj rajtos instrui Esperanton en la lernejoj.

En Hago ili vizitis s-ron Cseh, kiu rakontis pri sia rekta metodo kaj donis ekzemplajn de sia instrumaniero. La ĉeestantoj ne nur multe lernis dum tiu manifestacio, sed ankaŭ bone amuziĝis per la lertaj kaj spritaj manieroj de la konata majstro.

Poste s-ro F. Winkel, kiel prezidanto de la fondaĵo „Esperanto bij het Onderwijs”, klarigis al ili la laboron de ĉi tiu institucio, en kiu kunlaboras Esperantaj unuig-oj kun asocioj de instruistoj de divers-specaj lernejoj.

Li i.a. priparolis la skriban kurson, kiu havas 60 geanojn; la ekspozicion, kiun ĝi ofte sendas al kunvenoj de fakuloj

ĉe la instruado;

la komisiojn pri la altaj, la mezaj kaj la bazaj lernejoj, kiuj faras raportoĵn kaj pristudas la eblojn por enkonduki Esperanton sur ĉiuj niveloj de la instruado.

Fine li klarigis la intencon de la nova leĝo, parte rezulto de petskribo kun 60.000 subskriboj.

La lastan viziton en la kadro de tiu ekskurso ili faris al la Centra Oficejo de la „Universala Esperanto-Asocio” (UEA) en Rotterdam, kie ili ricevis multajn informojn pri la instruagado en la tuta mondo kaj precipe koncerne la konferencojn pri la instruado de Esperanto, kiuj okazis en 1964 en Belgrado kaj okazos en 1965 en Anglujo.

Kun multaj impresoj ili reveturis hejmen por trankvile pripensi ĉion, kion ili konstatis, kaj poste pristudi la eblojn sur ĉi tiu tereno en propra lando, kie la cirkonstancoj kompreneble estas aliaj ol en nia lando.

Ni forte esperas, ke ili havos sukceson kaj volonte helpos ilin per konsiloj aŭ priparoladoj.

Bonan sukceson, karaj gesamideanoj, s-ro Vanbreuse, gesinjoroj Bonaventure kaj la aliaj! Kaj eble: „Ĝis revido”!

J. R. Janssen.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO PROPONITA POR LA NOBEL-PRE- MIO POR PACO EN 1965.

Granda nombro da parlamentanoj kaj aliaj elstaraj personoj de la publika vivo faris proponon al la Nobel-Komitato en Oslo, ke ĝi aljuĝu la Pac-premion al U.E.A. pro la disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto.

Inter la proponintoj troviĝas 72 membroj de la sveda parlamento kaj 60 anoj de la dua ĉambro de la nederlanda parlamento.

KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ. TRA LA LIBRARO.

„NEDERLANDA ESPERANTA JUNULARO”.

Pentekosta Konferenco en AMSTERDAM de le 5-a de junio ĝis la 8-a de junio 1965-a.

Ĉiuj programeroj okazos en la salonoj de la Studenta Hejmo kaj Anne Frank Domino. La kotizo por ĉi tiu kvartaga ĝuinda konferenco estas nur gld. 18,75. GRAVE!: Repago de vojaĝkostoj tiom, kiom oni estos paginta pli ol gld. 5,—. Aliĝu tuj! Adreso: Roberto Groeneveld, sekr. de NEJ, Makassarstraat 112 III, Amsterdam.

Germana Esperanto-Kongreso.

Düsseldorf, la plej moderna kaj belega urbo de okcidenta Germanujo, invitas en- kaj eksterlandajn esperantistojn partopreni en la 43-a Germana Esperanto-Kongreso, Pentekoston 1965 (4-a ĝis 7-a de junio 1965-a). Aliĝilojn kun esperantlingva urboprospekto sendas al vi: 43-a GERMANA ESPERANTA KONGRESO, Herzogstrasse 79, DUSSELDORF 1, Germanujo.

Vojaĝo al Tokio per „S.F.J.”.

De sinjoro Henri Dabezies, Parizo, FD de UEA, ni rivecis informojn, ke ekzistas ebleco vojaĝi al Tokio pere de la „Société Franco-Japonaise”, kiu ĉiun jaron aranĝas rondvojaĝon de Parizo al Japanujo.

Ĉiu, kiu ĝis nun ankoraŭ ne planis sian vojaĝon al Tokio, kontaktu kun tiu asocio. Adreso: 192 Boulevard Saint-Germain, Paris 7. Planita estas vojaĝo kun rondveturo en Japanujo. Forveturo el Parizo 25/7 per aviadilo. Reveno 27/8 tra Moskvo kaj Bruselo. Kostoj de la tuta vojaĝo 4350 fr. frankoj.

Petu pluajn informojn ĉe supra adreso.

Eŭropa Ferio-Semajno en Svislando.

Informoj pri Eŭropa Ferio-Semajno en Caslano apud Lugano (Svisujo) de 22-28 aŭg. 1965 haveblaj ĉe s-ro Hans Hunkele, poŝtfako 417, CH 5001 AARAU (Svislando). Referenca adreso en Nederlando: S-ro This M. Blaauw, Begoniastraat 2, ZWOLLE.

TRA LA LIBRARO.

„SOIFO” poemkolekto de Lajos Tárkony
Antaŭparolo de K. Kalocsay. Kovrilo de Jan Schaap Jr. - Eldonis STAFETO J. Régulo, La Laguno, Kanariaj Insuloj. Formato 16 x 22 cm., 230 paĝoj, broŝurita. Prezo f 8,60. Mendebla ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Borniastraat 95, Leeuwarden.

Realigis deziro de W. Auld esprimita en lia enkonduko al la „Esperanta Antologio”: J. Régulo publikigante kaj tiel vaste diskonigante la verkajn fruktojn de diversaj poetoj, enmerkatis kolekton da poemoj de L. Tárkony. La nomo de tiu hungara verkisto, precipe antaŭ la lasta mondmilito (kiam li publicis ankaŭ sub la nomo Ludoviko Totsche) estas sufiĉe konata. Multe kontribuis li al la iama revuo „Literatura Mondo”, ankaŭ al „Bibliografia Gazeto”, al „Lingvo Libro”, al „La Nica Literatura Revuo”. Poemoj liaj aperis en *Dek du Poetoj* (1934) kaj Auld elektis dekkvaron el ili por sia *Esperanta Antologio*. Laŭdojn Tárkony akiris antaŭ kelkaj jardekoj pro siaj bonegaj analizaj kritikoj, ekzemploj por multaj recenzistoj. Tamen oni ne kredas, ke li regule verkis en Esperanto; estis jaroj, en kiuj li tute malaperis de la scenejo verkista, sed fine li revenis al sia amata laboro por nia internacia lingvo.

La kolekto ĵus aperinta ampleksas pli ol 100 poemojn kaj la unua impresio estas: simplaj, sed neniel banalaj. La versformoj estas multifacetaj: sonetoj, odoj, japaneskoj, trioletoj, tririmoj (kvarliniaj poemoj, el kiuj ia unua, dua kaj kvara versoj rimas, laŭ la persa ekzemplo, kiun konigis *Waringhien* per sia traduko de la poemoj de Omar Kajam), foje rondelo. Influis la poeziaĵojn de Tárkony la verkistoj Kalocsay, Dresen kaj Waringhien. La paletro estas diverstema kaj buntkolora. Laŭdire poezio estas ĉie, tamen kiu ne havas en si poezion, trovos ĝin nenie. Tárkony trovis ĝin; li verkis pri knabo, soleco, vespero, tombejo, febro, aŭtuno, patrino, avino, lito, larmoj, legitaj libroj, grekaj mitoj, mondhistorio kaj multaj aliaj temoj. Li montris sin muzikamanto, ŝakludanto, admiranto de eminentuloj en la esperanta movado, pura lirikisto kun iom da melankolio, impresionisto, kiu laŭ Auld apartenas al la polurita romantis-

mo. Kaj ĝuste pro tio ĉi lasta lia verkaro impresas nemoderna kaj troligita al la ekstera formo. Tial plejverŝajne multaj, kiuj prilaudas la modernistojn inter niaj poetoj, opinios lin konservema poeto suriranta la jam delonge multtreditajn padojn. El tio oni tamen ne konkludu, ke lia verkaro ne imponas, kontraŭe oni trovas multajn juvelojn, kiuj plaĉas al ŝatantoj de simpla poezio, pri kiu cerbumado superfluas (kaj de tiaj personoj ekzistas multaj en Esperantujo), kvankam evident- te Tárkony mem bezonis multe da cerbu-

mado, precipe por verki siajn tririmojn, formo miaopinie iom monotona kaj vole nevole kondukanta al adasismo. Tamen la kolekto estas kaj restas nepre leginda kaj sekve (laŭ la angla verkisto John Ruskin) aĉetinda.

P. M.

La estraro de la **Internacia Esperanto-Somerumejo**, PRIMOSTEN, Jugoslavio, sendis al ni prospekton kun ĉiuj informoj kaj tre bele ilustritan faldfolion pri la somerumejo.

LINGVAJ PROBLEMOJ.

21. Ĉu eraroj aŭ ne?

Legante Esperantan tekston, oni povas rimarki eraron, kie fakte ne estas eraro, kaj preterrigardi eraron, kiu tamen troviĝas ie en la frazo. Tio ofte dependas de la tempo aŭ la atento dediĉita al la legado aŭ de la lingva sento, sperto aŭ opinio. Kelkajn erarojn ĉiu tuj rimarkas, respektive agnoskas; pri aliaj oni povas diskuti longtempe. Tiam vere temas pri lingvaj problemoj.

Mi legis plurajn recenzojn pri la libro „Frisaj Rakontoj en Esperanto”, kiun mi partete tradukis, sed tute finredaktis, do ĉion legis, relegis, korektis, poluris, pri- korespondis kun la gekunlaborintoj.

Ĉe la revizio mi malkovris eraretojn, kies korektojn mi povis ankoraŭ aldoni sur aparta folieto. Montriĝis, ke tiuj eraroj enŝteliĝis ĉe la rekompostado de linioj, en kiuj mi korektis eraron en la presprovo. Ofte okazis, ke malaperis la indikita kaj aperis du novaj, kiujn mi ne povis rimarki pli frue ol en la presita, preta libro.

Mi tre bedaŭras la restintajn kaj poste enŝteliĝintajn eraretojn, sed ĝojas, ke recenzi- zinto povis fini sian recenzon per „Ĝenerala impresio: leginda kaj *postinda* libro”.

La kursiva vorto verŝajne devas esti: *posedinda*, sed ĝi pruvas, ke ĉiu povas rimarki erarojn ĉe aliaj kaj preterrigardi siajn proprajn. Konsolo por ni ĉiuj!

En la sama recenzo („Lab. Esp.” n-ro 3, 1965) mi kun intereso legis la deman- don: „Kial uzi la sufikson „ig” en: Hon- tu, ke vi tiom rapidigas en dimanĉo! Ĉu influo de la nederlanda kaj frisa esprimoj „haast maken?”.

Tie la recenzinto rimarkis eraron, kie laŭ mi ne estas eraro. Do lingva proble- mo priparolinda.

Per la sufikso „ig” oni povas formi transitivajn verbojn el diversaj vortoj, eĉ el verbaj radikoj netransitivaj aŭ per si mem jam transitivaj. Ekzemple: el ntr „dormi” oni formas „dormigi” = „doen slapen”, „in slaap brengen”; el tr „kudri” oni formas „kudrigi” = „doen naaien” of „laten naaien”.

Iu kiu ne povas dormi, dormigas sin per pilolo, kaj kiu povas aŭ ne volas mem kudri veston, kudrigas ĝin, igas iun alian kudri la veston.

Rapidi = esti rapida; agi rapide. Ne- derlandlingve: zich spoeden; zich haas- ten; haast maken. Ekzemple: mi rapidas por esti ĝustatempe ĉe la stacidomo.

Se iu kunvojaĝos, mi volas, ke ankaŭ tiu rapidu por ne bremsi mian intencon. Tial mi instigas lin aŭ ŝin al rapideco: mi igas lin aŭ ŝin rapidi = mi rapidigas lin aŭ ŝin = ik spoor hem of haar aan tot haast.

Tio ŝajnas al mi absolute ĝusta formo.

Oni tamen devas tre atenti tiun sufik- son „ig”, ĉar en la sama recenzo estas la esprimo, ke la rakontoj estas „tre inter- esigaj”. Tie la sufikso ŝajnas al mi super- flua, ĉar „interesi” estas transitiva verbo, do „interesa rakonto” interesas la legant- (in)on.

Io interesa = iets belang(stelling)wek- kends.

Rakonto interesa = een boeiend ver- haal.

Verŝajne tiu sufikso aperis sub influo de la nederlanda formo „belang(stelling)- wekkend”.

Bonvolu atenti tiun erarigan sufikson!

Tjerkwerd, 2-4-1965. S. S. de Jong Dzn.

Ned. Esperantisten-Ver. „La Estonto Estas Nia”

Sekr.: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort (Z.).
Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Kasistino: F-ino P. Oosthoek, Bree 49 a, Rotterdam-25.
Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de la unuiĝo.

KONCIZE

En legolibro por lernantoj de elementaj kaj mezaj lernejoj: „De bonte wereld van heden en verleden” II (Eld. Roelofs van Goor, Meppel) la kompilinto G. Blankesteijn envicigis ankaŭ ĉapitron „Esperanto, een wereldtaal”. Simpatia, bona informado pri nia lingvo.

„Monda Kulturo”.

Bedaŭrinde tiu periodaĵo ĝis nun ne multe estas legata en nia lando. Tiun malatenton ĝi certe ne meritas. La ĵus aperinta numero aspektas tre plaĉe kun nova kovrilo. La altnivelaj artikoloj pritraktas interesajn aferojn. Belaj fotoj kaj poemoj. Estus granda perdo, se tiu periodaĵo pro manko de abonantoj pereus!

La elstara **kultura, socia kaj literatura revuo** „NORDA PRISMO” daŭre vivos. Restas kiel ĉefredaktoro d-ro Ferenc Szilágyi. La ĝisnuna programo de „N.P.” restos. La abonotizo por 1965 estas sv. kr. 14 aŭ egalan valoron de alia ŝanĝebla valuto. Adm. adreso: „NORDA PRISMO”, Postfack 16, SKÖVDE (Svedlando).

INTERNACIA SPECIMENA FOIRO EN BARCELONA.

Jam de kelkaj jaroj la Organiza Komitato de la indikita Foiro publikigas belan afiŝon ankaŭ en la internacia lingvo.

Por ke la aperigado daŭru, estas necese ke la esperantistaro, speciale la Grupoj, skribu al la suba adreso, petante kelkajn afiŝojn en Esperanto, kiujn oni sendos senpage.

Skribu tuj al:

FERIA OFICIA LE INTERNACIONAL DE MUESTRAS - Paseo Maria Cristina (Parque Montjuich) BARCELONO (Hispanujo).

ESPERANTO-RADIO-DISSENDOJ.

Radio Bilbao (Bilbao en Hispanujo) denove dissendas en Esperanto. - La hispana stacio de Bilbao sciigis, ke ĉiumerkrede nokte, de la 24.30 ĝis la 00.55 (Nederlanda tempo), do de duono post noktmezo ĝis 5 minutoj antaŭ la unua, ĝi denove dissendas la interesan programon „ESPERANTO SUR LA ANTENO” sur ondlongo 265 m aŭ frekvenco 1133 kHz.

La enhavo de la programo estas tre varia: informoj kaj komentoj pri esperantistaj temoj, literaturo, poezio, rakontoj, respondoj al skribintoj k.t.p.

Kunlaboro kaj aŭskultraportoj estas ege dezirataj.

Verkas kaj prezentas la programon s-ro Julio J. Juanes.

Adreso: „Radio Bilbao”, Bilbao (Hispanujo).

Sugesto de la ĉefdelegito de Hispanujo. - S-ro Ramon Molera, ĉefdelegito de U.E.A. en Moyá (Barcelona) skribis al mi, ke li malĝoje legis pri la silento de Radio Berno kaj ke li de tempo al tempo skribas al la ĉefaj Radio-Stacioj dissendantaj Esperanton kaj instigas aliajn fari same, ĉar eble la ĝenerala esperantistaro forgesas ĉi tiun devon. Tial estas rekomendinde forte insisti pri tio en la gazetaj komunikaĵoj. Li redaktis cirkulereton al diversaj samlandaj gesamideanoj por atentigi ilin pri tiuj devo kaj eblo. Tiel certe venos aŭ jam venis laŭ li 50 skriboj el Hispanujo kun bedaŭro pri la ĉesigo de la Esp.-programoj. Se ĉiu lando reagus same, certe ankoraŭ iomete ni povus fidi la revivigon de la esendoj en internacia lingvo tra la mallongaj ondoj de tiu stacio. Imitinda ekzemplo!

S. S. de JONG Dzn,
(estro Radio-Servo F.E.N.).